IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 53 - trimonata
2023/3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Cosetta Bernardi
Rob Ebenau
Alessio Giordano
Gong Xiaofeng (Arko)
Marija Jerković
Aranka Laslo
Blanka Laslo
Stefan MacGill
Alessandra Madella
Danijela Petrović
Radojica Petrovič
Svetlana Pogorelaja
Ahmad Reza Mamduhi
Cesco Reale
Jovan Zarkovič



Impresoj pri nia Kongreso (p.7)

ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Ahmad Reza MAMDUHI: *ILEI-kongreso 2023: la plej hibrida kongreso!* 4
Impresoj pri la ILEI-kongreso (Danijela PETROVIĆ kaj Blanka LASLO) 7
Instruista trejnado pri interkultura kompetento (Radojica PETROVIĆ) 7
Alessandra MADELLA: *Pri Sgrafitoj de MA-GA-Filmoj* 10
Alessandra MADELLA: *Pri Virina Agado kaj la Kongresa Temo* 12
Erasmus+ por ILEI: Alvoko el Serbio (R. PETROVIĆ, A. LASLO, J. ZARKOVIĈ) 16
Superrigardo pri inkluziva lingvaĵo (II.) (Cesco REALE, Alessio GIORDANO)..... 19
El la landoj kaj sekcioj (CN, IT, HR, RS, UA) 25
AMO, EKO kaj dissendo de instruhelpiloj (Stefan MACGILL) 31
Malkovru, lernu kaj uzu Esperanton kun uTalk! (Rob EBENAU) 32
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj 36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Ĵanejro cep 21220-310, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram,WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah
Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Impresoj pri la ILEI-kongreso (*vd la artikolon de Danijela Petrović kaj Blanka Laslo sur p. 7*)

Dorskovrile: Grafikaĵoj de Alessandra Madella por la filmo Sgrafitoj (*vd. p. 10*)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Alia ILEI-kongreso okazis sukcese, kaj unuafoje hibride, t.e. kaj ĉeeste kaj virtuale. Feliĉe dum la lastaj jaroj – „danke al" la pandemio – ni multon lernis por pli facile kaj pli efike utiligi la virtualan spacon. Tiel, ke nun, kiam ni povas reiri al la tradiciaj nur-ĉeestaj kunsidoj, ni ne emas forlasi la egajn avantaĝojn, kiujn dediĉis al ni la interreto. Ni fieru, ke ILEI okazigis la plej hibridan grandskalan kongreson en Esperantujo. Laŭ mi, la hibrideco multe pli alirebligas niajn kongresojn, ĉar pere de tio nun:

1. Tiuj, kiuj povas partopreni fizike en la kongresoj, ankoraŭ ĝuivas la ĉeestan kontakton kun siaj samideanoj tute senpere kiel antaŭe.

2. Tiuj, kiuj kial ajn ne povas tion fari, kapablas tre facile – kaj ege malmultakoste – aliĝi virtuale al la kongresoj kaj partopreni en ili ankaŭ aktive, t.e. prezentante siajn prelegojn kaj/aŭ liverante siajn komentojn kaj demandojn reage al la prezentaĵoj.

3. Tiuj, kiuj kiel ajn ne povas aliĝi al la kongresoj eĉ virtuale, povas pli poste ĝui multajn programerojn de la kunvenoj per spektado de iliaj registraĵoj – kaj eĉ esprimi siajn komentojn kaj demandojn sube de la registraĵoj.

Sur pli ol 10 unuaj paĝoj de tiu ĉi numero vi legos pri la avantaĝoj kaj fruktoj de la nova kongreso de ILEI el diversaj vidpunktoj.

Mi kredas, ke future la kvalito kaj la sento de la virtuala partoprenado iĝos eĉ pli kaj pli proksimaj al tiu de la fizika – tamen ankoraŭ la ĉeesta partopreno certe konservos sian unikan econ: „homoj kun homoj!"

Ahmad Reza MAMDUHI

ILEI-kongreso 2023: la plej hibrida kongreso!

de Ahmad Reza MAMDUHI (Irano)

Feliĉe nia Kongreso en 2023 (kiu okazis ekde la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto) probable estis la plej amplekse hibrida kunveno en tia skalo almenaŭ en Esperantujo. Plimultaj programeroj de la Kongreso okazis hibride, tio signifas, ke kongresanoj povis partopreni kaj prelegi en ili kaj ĉeeste kaj virtuale, dum ĉiudirektaj demandoj-kaj-respondoj estis relative facile eblaj. Ja ankoraŭ multon ni povas lerni, plibonigi kaj progresigi, tamen laŭ mi eĉ la jamaj atingaĵoj kaj lertoj estas sufiĉe kontentigaj ankaŭ por la virtualaj kongresanoj, kiuj divers-kiale/kiele ne povis/sukcesis ĉeesti la grandiozan kunvenon – kaj kiuj multege malpli elspezis tempe, energie kaj ekonomie.

Proksimumaj statistikoj pri la eroj de la ILEI-kongreso 2023[1]

La nombro de	Ĉeestaj programeroj				Hibridaj programeroj	Sumo
Dato en 2023	Kurs-sesioj	Koncerto, muzik-programoj	Eks-kursoj	Aliaj program-eroj	Aliaj programeroj	
6-a de aŭg.	1	1	0	0	8	10
7-a de aŭg.	2	1	1	2	11	17
8-a de aŭg.	2	1	2	3	17	25
9-a de aŭg.	0	0	2	0	0	2
10-a de aŭg.	2	2	1	3	14	22
11-a de aŭg.	2	1	0	4	8	15
Sumo	9	6	6	12	58	91

Kiel videblas kaj vidindas sur la supra tabelo:

1- La kolumnoj Kursoj, Koncertoj kaj muzikprogramoj kaj Ekskursoj nun aŭtomate aŭ senpripense taksiĝis kiel nur-ĉeestaj programeroj, malgraŭ tio, ke jam de jardekoj aldone ili okazas ankaŭ virtuale kaj eĉ tre sukcese – kaj ree eĉ en nia Esperantujo! Ekz-e rememoru interesajn ekskursojn kadre de la antaŭaj virtualaj UK-oj kaj ILEI-

[1] Kiel okazas en preskaŭ ĉiuj (grandaj) Esp-kunvenoj, kelkaj programeroj ŝanĝiĝis dumkongrese, sed tiujn mi ne observis, ĉar mi preparis la tabelon simple nur surbaze de la Kongres-programo, kiu restis senŝanĝa en la retejo de la evento: https://2023.kongreso.org/ILEI_chefa.php

kongresoj (VK-oj kaj VEKI-oj). Mi certas, ke estontece ankaŭ tiaj programeroj tute nature fariĝos hibridaj kaj ege pli interesaj: por momento imagu tiajn ekskursojn, dum kiuj malĉeestaj partoprenantoj demandadas la ĉeestajn pri la vidindaĵoj kaj iliaj proprecoj – kaj tion, ke ankaŭ ili mem povas (komparante) prezenti sia-lokajn vidindaĵojn kaj kutimojn ree al la ĉeestaj kongresanoj!

2- Se ne (en)kalkuli la suprediritajn kolumnojn, en nia Kongreso 58 programeroj okazis hibride (83%) dum nur 12 okazis nurĉeeste (17%)!

El inter la estraranoj de ILEI, bonŝance kelkaj partoprenis ĉeeste kaj kelkaj virtuale, do ni povis havigi niajn spertojn unu al la alia por pli bone plani kaj okazigi la estontajn kunvenojn hibride. Mi estis inter tiuj, kiuj partoprenis en la Kongreso virtuale, kaj preskaŭ ĉiam ĉeestis la Kongreson, kiam kaj kie programero ĝuis hibridecon. De tempo al tempo ja ekestis teknikaj problemoj por (bone) aŭdi kaj/aŭ paroli dum tiu aŭ alia kongresero, sed la plejmultaj partoprenadoj estis sukcesaj kaj interagaj.



Mi kredas, ke alia grava avantaĝo de virtualeco/hibrideco de kunvenoj estas tio, ke registrado de la programeroj povas okazi relative facile kaj per ne tre multaj aliaj rimedoj. Tiel, post la kongreso ni povis/as ege facile kaj iom-post-iome publikigi multajn prelegojn kaj alispecajn kongreserojn en nian jutuban kanalon (https://www.youtube.com/@EsperantoEdukadoILEI) por ĉies spektado. Tuja videto al la retejo montras, ke plejmultaj registraĵoj jam ĝuas altnombrajn vidojn kaj ŝatojn – kaj tio fakte povas daŭri plu kaj pli kreski por ĉiam. Mi bone memoras, ke jardekojn antaŭe, kiam mi ekspertis ĉeeste ege interesajn kongreserojn, mi vere miras, kial oni ne registras ilin

por postaj publikigadoj kaj spektadoj: treege domaĝe valorega prelego de granda esperantisto aŭskulteblis nur unufoje kaj nur por limigita nombro de spektantoj – tiuj, kiuj povis ĉeesti la koncernajn UKon kaj prelegon. Ege maloftis eĉ pliposta teksta reproduktado de tiaj valoregaĵoj.

La retejo de la Kongreso - https://2023.kongreso.org/ILEI_chefa.php - estas daŭre alirebla por ĉiuj – kaj espereble ĝi restos tia por ĉiam. Mi esperas, ke en la reteja Programo de la Kongreso multaj titoloj de la kongreseroj fariĝos ligiloj, per kies simpla klako oni povos ek-spekti la registraĵojn de la programeroj. Ideale, sub ĉiu registraĵo estos loko por diversaj komentoj cele al ekigo kaj daŭrigo de konstruivaj diskutoj kaj fine (el)trovo de vojo por ekstrakti/ekspluati ion utilan kaj progresigan el la prezentaĵo.

Do, tiel, niaj kongresoj ĉiesigante interesajn nov(ig)ajn pedagogiajn materialojn, jam havas multon kaj por ĉeestaj kongresanoj (fizike), kaj por forestaj aliĝintoj (virtuale), kaj por nekongresanoj (registrite)!



Seminario pri „Interkultura kompetento" en hibrida formo. Projekto Erasmus+ KA2. Fina foto kun la partoprenantoj ĉeeste kaj rete

En tiu ĉi numero de IPR vi trovos kelkajn materialojn pri la ĉi-jara Kongreso, do mi ne tro longigas la mian per listigado kaj priskribado de la kongreseroj – aparte ĉar jam en la supre menciita Programo de la Kongreso per simpla klako sur Detaloj de ĉiu kongresero vi povas facile legi priskribon de la prezentaĵo kaj biografieton de la prezentinto.
Bonegan legadon!

Impresoj pri la ILEI-kongreso

Ni havis la bonŝancon partopreni en la 56-a ILEI-kongreso, kiu okazis en Lignano Sabbiadoro, Italio. Por Danijela ĉi tiu kongreso estas la unua en ŝia ĝisnuna, mallonga Esperanta vivo, ĉar ŝi komencis lerni Esperanton en februaro 2022. Por Blanka ĝi estis la dua ILEI-kongreso. Krome, Blanka estis akompananto de la blinda esperantistino Danijela.

Nian partoprenon kaj vojaĝon ebligis subvencio de Erasmus+ al la KA1-projekto de Serbia E-Ligo (SEL). Krom ni, venis ankoraŭ 3 aliaj membroj de SEL, kiuj partoprenis en la samtempa IJK, kaj 2 instruistoj sekvis la ILEI-kongreson rete.

La plej grava programero por ni estis la Trejnseminario por instruistoj kun la ĉeftemo „Interkultura kompetento", gvidata de elstaraj profesiaj prelegantoj el diversaj landoj. La temo estis tre interesa, ege grava kaj stimula por ĝenerala progreso en la vivo kaj en homa interkompreno. Dum la prelegoj kaj ekzercoj la partoprenantoj interŝanĝis siajn diversajn spertojn kaj ankaŭ diskutis pri homaj kondutoj kaj pri imagitaj situacioj, en kiuj montriĝas interkulturaj diferencoj.

La tuta semajno estis tre amuza kaj dinamika, ĉar ni ĝuis multajn programojn, kiel: trinkomanĝa nokto, koncertoj de JoMo kaj de Ĵomart kaj Natašа, popoldancoj kaj korea kaligrafio. Ni ekkonis multajn novajn amikojn, ĉefe el Italio, Germanio, Albanio, Rusio, Svislando kaj Koreio. La tuta kongreso havis ege specialan etoson, ĉar oni povis kompreni unu la alian pere de la internacia lingvo Esperanto. La homoj estis agrablaj kaj tiun memoraĵon ni gardos en niaj koroj.

Danijela PETROVIĆ kaj Blanka LASLO, el Serbio

Instruista trejnado pri interkultura kompetento

La hibrida ILEI-kongresa trejnseminario „Interkultura kompetento" daŭris kvar tagojn po tri horoj, entute 12 horojn. Ĉiutage partoprenis averaĝe 35 personoj en la seminariejo kaj 5 perrete el 23 landoj – ekde Kanado kaj Usono okcidente, ĝis Japanio kaj Indonezio oriente. IIE (Itala Instituto de Esperanto) kaj ILEI eldonis 37 partopren-atestilojn al tiuj, kiuj partoprenis minimume ¾-e, respektive 9 horojn. Prelegis Duncan Charters, Renato

Corsetti, Vicente Manzano-Arrondo (Viko), Latifou Gbadamassi kaj John Magessa. Radojica Petroviĉ kunordigis neĉeeste, Laura Brazzabeni kaj Francesco Maurelli surloke stiris la programon. La partoprenantoj kontribuis vigle kaj abunde per siaj demandoj kaj rakontoj.

Duncan Charters enkondukis la seminarion per para ekzerco, en kiu la partoprenantoj duope interŝanĝis siajn spertojn, pozitivajn kaj negativajn, el interkulturaj renkontoj, kaj poste buŝraportis siajn konstatojn al la tuta grupo. En sia prelego li analizis la bazajn konceptojn kaj principojn de interkultura komunikado, la ses evoluŝtupojn de interkultura sentivo laŭ Milton Bennett[2], kaj la bezonon kaj vojojn de edukado al interkultura kompetento. Li turnis la atenton al komunike esencaj sintenoj kaj al dominaj komunikproblemoj, kaj diskutis la karakterizajn trajtojn kaj bazajn postulojn de interkultura komunikkompetento.

Ĉio tio havas specifan signifon en Esperanto-komunumo. Kion pri kulturaj normoj por Esperanto? Ĉu la esperantistoj reale vivas siajn idealojn? Aŭ ĉu ili tendencas minimumigi la diferencojn? Serĉante ĉiam tion, kio unuigas, kio estas komuna, oni povas neglekti la kulturajn diferencojn anstataŭ rekoni, kompreni kaj praktike alfronti ilin. Ĉu ekzistas universalaj valoroj, validaj en ĉiuj kulturoj, ekzemple: amo, vero, justeco, libereco, unueco, respondeco, respekto al la vivo?

Renato Corsetti donis la historian perspektivon al la kultura imperiismo kaj ĝia evoluo tra epokoj kaj regionoj ĝis la hodiaŭa situacio kaj la pozicio de esperantistoj en ĝi. Konsiderante la profundan diversecon de kulturaj fonoj, el kiuj venas la membroj de la Esperanto-komunumo, li emfazis la demandon ĉu unika Esperanto-kulturo eblas. Li sugestis negativan respondon.

Viko parolis pri homaj kondutoj kaj klarigis erojn de kohera homa agado kaj sinteno. Kun siaj filino Gabriela kaj kunlaborantino Unika li organizis interagan atelieron, en kiu la partoprenantoj renkontigis sin kun siaj verŝajnaj kondutoj („kion vi farus, se …") en tri imagitaj situacioj:

- Problemsolvado en grupa laboro
- Konduto de plenkreskuloj renkonte kun infanoj
- Kiel vi agus, se vi vidus homon, kiu faras fiaĵon antaŭ via hejmo?

[2] IPR 05/3, p. 17-18 (Edukado pri diverseco), rete: https://drive.google.com/file/d/15ZImfSfYWKagAH_b2ym99LI0e9Oz2Zxq/view

kaj poste povis trapensi siajn reagojn en la perspektivo de diversaj tipoj de kondutoj. La partopreno de la okjarulino Gabriela donis la intergeneracian dimension al la interkultureco: kiel la infanoj perceptas kondutojn de plenkreskuloj. La kore-devena Unika prezentis siajn interkulturajn spertojn kaj alkutimiĝojn en Japanio kaj Hispanio. Afrikaj partoprenantoj unua-aŭde eĉ ne komprenis la vorton priskribantan la fiaĵon en la tria imagita situacio. En iliaj kulturoj la hejmo estas tiom grava kaj respektata loko, ke tian fiaĵon antaŭ ies hejmo oni simple ne faras.

La prelego de Latifou Gbadamassi pri afrikaj kuriloj kaj de John Magessa pri Tanzania kulturo inspiris diskuton pri diverseco de manĝkutimoj kaj aliaj tradiciaĵoj.

Ne planita elemento de interkultura komunikkompetento, tamen praktike alfrontita dum la seminario, rilatis al la teknika kulturo: Kion vi faras, se dum hibrida (ĉeesta kaj perreta) kunveno la retkonekto lamas? Aŭ, kiel vi kondutas, se la retaj partoprenantoj sidas en diversaj tempozonoj, venas el diversaj sociaj tavoloj kaj posedas diversnivelajn teknikajn rimedojn kaj lertojn?

Tuŝitaj sed ne traktitaj dum la seminario estis temoj de pluplanoj kaj bezonoj de edukado al interkultura kompetento en niaj rondoj, ekzemple:

- Evoluigo de la interkultura edukado, trejnado de trejnistoj,
- Oferto al aliaj internaciaj organizoj,
- La roloj de UEA, ILEI, TEJO,
- Interkultura manlibro por esperantistoj,
- Interkultura retpaĝaro kiel instruilo kaj edukilejo.

Organizita enkadre de projekto de Itala Instituto de Esperanto kun aliaj partneroj, subvenciata el Erasmus+, ĉi tiu seminario prezentas bonan modelon por venontaj aranĝoj samcelaj. La unua el ili estas planata por Aŭgusto 2024 en Serbio kun aprobita subvencio de Erasmus+ (*vidu la paĝon 16 de ĉi tiu numero)*. Alia partnera projekto povus plani interkulturajn manlibron kaj retpaĝaron kiel siajn produktojn.

Radojica PETROVIĈ (Serbio)

Pri *Sgrafitoj*[3] de MA-GA-Filmoj

de Alessandra MADELLA (Italio)

Sgrafitoj, la nova filmo de MA-GA-Filmoj, premieris dum la 56-a ILEI-kongreso ĉe Linjano Orsabla (Lignano Sabbiadoro) en Italio en aŭgusto 2023. MA-GA-Filmoj kunigas la komencliterojn de la familiaj nomoj de siaj kreintoj, Maximiliano Garcia kaj mi. Ĝi naskiĝis je la fino de 2022 por krei originalajn filmojn en Esperanto, kunmetante la pasion de Max por arta aŭ etnografia fotado kaj la mian por animacio.

Nia unua filmo, la *Silka Vojo*, temas pri la naci-malplimultoj de la ĉina Xinjiang kaj spekteblas en sia integreco en la jutuba kanalo Esperanto + Edukado ILEI (https://www.youtube.com/watch?v=fYWUwtqeArI). Ĝi montras precipe la ujguran kulturon de tiu landlima provinco per intensaj kaj signifoplenaj portretoj de homaj vizaĝoj, fotitaj de Max Garcia dum sia vojaĝo tien antaŭ dudeko da jaroj. La komenca animacio pensigas al ni pri la signifo de la Silka Vojo, tra kiu historie pasis ne nur silkaĵoj, sed ankaŭ dancoj, muzikoj, bildoj, komercaj praktikoj kaj religioj. La kuraĝigaj reagoj – interalie de Humphrey Tonkin kaj de samideanoj el Uzbekio — estis sufiĉe multaj kaj varmaj, por ke ni decidu daŭrigi tiun ĉi aventuron.

Sgrafitoj estas la dua frukto de nia kunlaboro. Ni ambaŭ havis la senton, ke temas pri grava projekto kaj ke pli da tempo estas bezonata por ĝia kreado, ankaŭ por digne kontribui al la naskiĝo de nova kinarto originale en Esperanto. Kvankam ni komencis jam en 2022 tuj post *La Silka Vojo*, ni finis la laboron nur fine de junio 2023. La unua ideo venis al Max trarigardanta siajn arkivojn. Inter la miloj da fotoj, kiujn li faris dum jardekoj en la tuta mondo, multis la sgrafitoj. Ofte ne temis pri „belaj" artaĵoj, sed pri signoj de protesto. Tra la tuta mondo la formoj ofte ripetiĝis kaj estis reago al similaj problemoj, kio montras preskaŭ konscion serĉantan komunan lingvon por trovi esprimon. De la akvo-krizo al militoj, de la problemoj de studentoj kaj laboristoj al la kreskanta teknologia kaj komunikila kontrolado, ĉio kritike aperas sur niaj muroj. Ni estis kaptataj de la publika aspekto de tiuj mur- kaj strat-pentraĵoj, sed samtempe de ilia ofta mallongdaŭro kaj fademo. Se estas prahistoriaj ekzemploj, kiuj pluvivis dekmilon da jaroj, aliaj estas forlavitaj

[3] Noto: "Sgrafitoj" estas alternativa formo por "grafitioj", kiu troviĝas en la itala-Esperanta vortaro de Carlo Minnaja.

pro sia enhavo, formanĝitaj de atmosferaj elementoj aŭ blankigitaj por novaj projektoj, kiel okazis al la bela „arkoponto iĝanta ŝipo” sub fervoja ponto de Parmo, kiu fermas la filmon.



Sgrafitoj de chesta grupo de Dennis

Komence ni pensis pri *Sgrafitoj* kiel la enkonduka parto de pli ambicia projekto, kiu dokumentu la vivon de kelkaj mur-artistoj en malsamaj partoj de la mondo. Sed fine ĝi ensorbis tiom multe da niaj energio kaj atento, ke ĝi iĝis la projekto mem, ankaŭ dank’ al la fakto, ke multaj artistoj, kiujn ni kontaktis, donis al ni la permeson uzi iliajn verkojn. La ĉina pentristo Hao Fang Yuan (Atman One) sendis al ni sian ideogramon „unu” en la ĉina lingvo, dum la juna uzbeka sgrafitisto Inkuzart donis al ni la permeson uzi plurajn el liaj engaĝitaj artaĵoj, de ujguro simbole sin mortiganta per benzinpumpilo al Mona Lisa kun kontraŭ-kovima masko. Gloria Grau Ruiz kaj Marisol Caldito aldonis virinan vidpunkton, al kiu aludas la belaj sirenoj je la fino per sia trankvila forto kaj la imago de diversaj vivo-ebloj. La plej grava kontribuo estis, tamen, de Miguel Herberg, fama reĝisoro de engaĝitaj dokumentaj filmoj kaj iniciatinto de la animacia projekto de la „Kungfua

Kunikleto”. Li grandanime donis al ni la rajton uzi liajn fotojn pri la Muro de Berlino kaj per sia ĉeesto instruis tutan kurson de muntado al Max Garcia. Tio videblas en la kontinueco de similaj temoj kaj en la pensigaj rilatoj inter ili, kiujn la publiko de Linjano unuanime notis. Li ankaŭ prezentis al ni la vidvinon de sia amiko Julian Pacheco, kiu realigis la sgrafitojn en la tombejo de Montmartre kaj „inventis” murpentradon kiel artan formon. Mi referencas al li en la enkonduka animacio, kie mi reprenas lian tre buntan version de la pafado de Goya. Kiel ekzilito de la Frankisma Hispanio, Pacheco uzis fortajn kolorojn kritike, kiel reagon al la blank-nigra vivo, al kiu la dekstrula politiko kondamnis lian denaskan landon.

Sed grava kontribuo al nia filmo venis ankaŭ de esperantistoj. Fakte, dum du monatoj la juna ĉina samideanino Wei NingNa vizitadis la Esperanto-Plaĝon, intensivan kurson de Dennis Keefe proksime de la urbo Valencio en Hispanio. Kaj Max Garcia akompanis ŝin tien, ĝuante ties etoson. Dennis kaj la loka grupo prezentis al ili la plaĉan urbeton Cheste, kie la internacia lingvo tradicie tre fortas kaj kie troviĝas bela sgrafito pri „Esperanto...lingvo por la homaro, kaj por la paco inter la popoloj de la mondo”. Tiu foto ne nur ideale enmetas nian filmon en la historion de Esperanto-instruado, sed ankaŭ ebligas al ni fortigi la utopian sencon de nia konkludo, montrante kiel komuna egaleca lingvo povus kune pensigi kaj realigi pli sencoplenajn formojn de vivo.

Pri Virina Agado kaj la Kongresa Temo

Organizis la parton de la kongresa temo Laura Brazzabeni kaj mi (Alessandra Madella), kiu sole zorgis pri la parto de virina agado.

La kongresa temo „La instruado de Esperanto en lernejoj” estis tute kerna por la celoj de ILEI. Kadre de ĝi, Emmanuel Desbrières, Peter Grebc kaj Elena Nadikova prelegis pri la koresponda kaj interŝanĝa sperto de siaj gelernantoj inter Francio, Slovenio, Rusio kaj Ĉinio, kaj Didier Janot gvidis la duan forumon por lernejaj instruistoj, en kiuj multaj partoprenis kunpartigante siajn spertojn kaj opiniojn. Nina Daniljuk trairis la historion de la instruado de Esperanto en Ukrainio, fokusiĝante precipe pri universitata agado kaj siaj nuntempaj tradukaj projektoj, siavice Massimo Ripani analizis siajn spertojn de instruado al ukrainaj rifuĝintoj en italaj lernejoj. Mihai

Trifoj prezentis sian tutfreŝan aŭtobiografion, kie li rakontas interalie pri sia partopreno en la instruaj projektoj „Fundapax” kaj „Interkulturo”, dum Mónika Molnár rakontis pri sia aktiva instruado de Esperanto en la Lernejo de la Granda Ursino en Svislando kaj pri la elstaraj rezultoj de siaj lernantoj. Mirejo prezentis manierojn efike uzi la broŝuron „Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano de la mondo”, kaj Mirella De Martini rakontis siajn italajn spertojn ĉi-rilate. Siavice, Laura Brazzabeni, Brunetto Casini kaj mi klarigis pri la evoluoj de la kurso „30 Oraj Horoj” kaj pri la itala kaj Esperanta eldonoj de mia libro *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*, kiu ekis kiel „scienca dokumento” de la projekto kaj kiu espereble povos esti tradukita en aliajn lingvojn por faciligi adaptojn de la projekto mem. En tiun direkton iris ankaŭ la prestiĝa inaŭgura prelego de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, dum la Solena Malfermo, kiu multe ĝojis pri la nova atento je la temo de la facila lerneblo de Esperanto kaj ĝia potenciala lernofaciliga rolo. Li substrekis ankaŭ la dezireblon de vasta kunlaboro inter UEA kaj ILEI por realigi novajn eksperimentojn kaj studojn ĉi-rilate, por ekspluati la movadon reporti Esperanton en lernejojn komencitan de la „30 Oraj Horoj”.

Sed multe da aliaj aliroj al la instruado de Esperanto aperis dum la kongreso. Marija Jerković kaj Renato Corsetti, ekzemple, prelegis pri la frazeologio, kiu igas Esperanton vivanta lingvo. Ivano Kossey detale klarigis kiel uzeblas lia nova Esperanto-lernolibro tradukita al diversaj lingvoj, kaj Latifou Gbadamassi montris sian lernolibron por lerni Esperanton per afrikaj lingvoj kaj afrikajn lingvojn per Esperanto. Gong Xiaofeng (Arko) kaj Yu Jianchao brile pentris la ĉinan instruan situacion, prelegante respektive pri ties historio kaj perspektivoj kaj pri la figuro de la fama instruisto Laŭlum. Lin Liŝa aldonis al tio la projekton de la grupo de Tianjin pri interkultura instruado ligata al teo kaj nomata „Teo, Amo kaj la Mondo”. Rodica Todor kaj Vito Tornillo de IFEF kaj Lars Sözüer de BEMI parolis al ni pri la projekto VERDEN, subtenata de Erasmus+, kiu celas la edukadon al daŭripova transportado ankaŭ pere de Esperanto, kaj Larysa Osadchuk prelegis pri la multflanka utilo de origamio en la instruado de la internacia lingvo kaj proponis praktikan atelieron pri ĝi. James Piton montris kiel poŝtkartoj tra la mondo reprezentas la laboron de Esperanto-instruistoj preskaŭ ekde la komenco de la Movado.

Kiel menciite, alia grava temo de la kongreso estis „Virina Agado” aŭ la prezentado de la grava verko de elstaraj virinoj laŭ la tradicio de „virina

aŭtoritato” de la itala feminismo, kiu lasas spacon ankaŭ al debatoj kaj komunaj agadoj. Ofte tiu vidpunkto kunfandiĝis kun instrua agado. Ekz., Kolektivo Bernardoni (Ermanno Tarracchini kaj Laura Barbieri) prelegis pri la eduka penso de la itala samideana kuracistino Antonietta Bernardoni, prezentante la novan Esperantan version de ŝia verkaro, sed ankaŭ montrante la similecojn kun la pedagogio de Maria Montessori, kiun Bernardoni persone konis. Malgosia Komarnicka sendis video-prelegojn pri Marie Skłodowska Curie, sed ankaŭ pri la eduka kaj eldona agado de pliaĝulinoj en Pollando. Luiza Carol reverkis la finon de la opero *Aida* de Giuseppe Verdi por doni al ni idealan figuron de instruisto luktanta por paco kontraŭ stereotipoj pri etno kaj religio. Ties radiodramon muntis kaj unue elsendis Anton Oberndorfer en Esperanta retradio kaj mi rapide desegnis animacion el ĝi, ankaŭ kun la helpo de bildoj de polaj instruistinoj, kiu nun spekteblas en kvar partoj en la jutuba kanalo de ILEI (Esperanto + Edukado ILEI). (Jen ligo al la unua parto: https://www.youtube.com/watch?v=S8cKHTpnl0U).

Ankica Jagnjić prelegis pri Danica Bedeković kaj Antonija Jozičić, famaj kroataj samideaninoj, kiuj estis ankaŭ instruistinoj. Mirejo organizis debaton inter afrikaj virinoj el Madagaskaro (Miora Raveloharison, Lydie Rania Zafinifotsy kaj Fafah Rafanomezantsoa) kaj DR Kongo (Alexandrine Omba), kiu traktis interalie pri edukado de gefiloj kaj sukcesaj historioj de kariero en edukado por virinoj, malgraŭ grandaj ekonomiaj kaj kulturaj malfacilaĵoj.

Aliaj kontribuoj al la programo de „Virina Agado” venis de Anna Löwenstein, kiu donis novajn interesajn informojn pri la amata Esperanta verkistino Marjorie Boulton, kaj Aida Čižikaitė, kiu prelegis pri la lukto de la fratinoj Anna kaj Helene Michelau de Orienta Prusio por esti rekonataj kiel artistinoj. Isikawa Tieko prezentis la figuron de Verda Majo, kontraŭmilita japana esperantistino, kiu edziniĝis kun ĉina samideano kaj elsendis radi-mesaĝojn dum la dua mondmilito por persvadi japanajn soldatojn ne murdi ĉinojn. Mirejo legis ekzemplojn el sia kolekto de afrikaj proverboj pri virinoj, kaj Emma Breuninger parolis pri sia persona sperto kreski en Soveta Unio kiel filino de germana fizikisto post la Dua Mondmilito. Grava kontribuo pri elstaraj italaj virinoj venis de Cosetta Bernardi pri la entreprenistino Luisa Spagnoli kaj de Sara Spanò pri la verkistino Paola Masino, kiu certe meritus esti pli konata, same kiel Flannery O’ Connor, la usona verkistino, ankaŭ pri kiu Sara prelegis. Mi mem mallonge prezentis la vivon de Tina Modotti, fotistino, komunista aktivulino

kaj eble la plej internacia itala virino de la komenco de la dudeka jarcento, kiu naskiĝis ne malproksime de Linjano. Patrizia Rivaldi (la Joga Bubo de la animacio *La Aventuroj* de *Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo*) okazigis jogo-lecionon sur la plaĝo [*vd. surfote*], kunmetante ekzercojn precipe taŭgajn por virinoj, kvankam malfermajn ankaŭ al viroj.



Laura Brazzabeni kaj Clarissa Sabatini daŭrigis tiun malstreĉan agadon surplaĝe ankaŭ en la matenoj de la aliaj tagoj. Krome, Cristina Bollini surprizis ĉiujn prelegantojn de la tago per detala priskribo de iliaj flagoj kaj de multaj aliaj interesaj flagoj en la mondo, inkluzive de la malmultaj kun virinaj figuroj.

Fine, por klasĉambro, kie la vida parto iĝas pli kaj pli grava, ni ne povas forgesi la abundan filman programon de nia kongreso, kiu inkluzivis la premieron de la sepa parto de la Granda Homa Ĉeno, filmita ĉefe dum la Universala Kongreso de Torino kaj en Zaozhuang, Ĉinio. Tiu efika varbilo, laŭ la projekto de Maximiliano Garcia, spekteblas nun en la jutuba kanalo de ILEI (https://www.youtube.com/watch?v=7j_M03Op1Gg). Gravan kontribuon donis ankaŭ filmoj de ĉinaj reĝisorinoj pri nacimalplimultoj de Yunnan, sudokcidenta landlima provinco de Ĉinio. La filmoj de Zheng Nanxi, Tang Jingchuan kaj Zhang Di (kune kun Duan Jike) profunde kaptis la kulturon de la Hani-, Wa- kaj Bai-nacioj kaj ilian fieron pri tradiciaj vivmanieroj, nun ofte malaperantaj. *La Silka Vojo* de MA-GA-Filmoj (de la familiaj nomoj Madella kaj Garcia) simile prezentis proverbojn, muzikojn kaj vizaĝojn de la ujguroj de ĉina Xinjiang. Fine, premieris ankaŭ la nova verko de MA-GA-Filmoj, *Sgrafitoj*, kiu kontribuas al Esperanta filmografio per kritike pensiga sinteno, espereble alloga ankaŭ por la junuloj.

Parenteze, ni povas noti, ke de la 12-a de aŭgusto (kiam ni komencis alŝuti al la jutuba kanalo de ILEI videojn kaj registraĵojn de la kongreso) la vidoj multe kreskis, atingante eĉ 701 vidojn tage dimanĉon la 13-an. Laŭ datumoj de la 25-a de aŭgusto la aĝo de la spektantoj en la antaŭaj 28 tagoj multe juniĝis, kun 10,6% de la 35-44-jaruloj, 2,6% de la 45-54-jaruloj kaj 23,8%

de la 55-65-jaruloj. Helpis pri tio strategio de alŝutado de registritaj prelegoj (inter kiuj la plej populara estas tiu de Mónika Molnár) kaj pli mallongaj videoj kiel la Homa Ĉeno (epizodoj 7 kaj 8, respektive pri la UK de Torino kaj la kunkongreso de Linjano) kaj mikrofilmoj de Patrizia Rivaldi pri la alveno al Torino kaj al Linjano. Tio montras, ke ne nur la ĉeestantoj kaj Zoom-partoprenantoj ĝuis nian programon, sed pli larĝa publiko povos longdaŭre kaj fruktodone spekti ĝin interrete.

Alessandra MADELLA (Italio)

Erasmus+ por ILEI: Alvoko el Serbio

Por instrui Esperanton ne sufiĉas instrui Esperanton.
Por instrui Esperanton necesas:

1. lertigi instruistojn/antojn
2. trovi lernontojn
3. elekti/krei taŭgajn lernrimedojn
4. aranĝi adekvatan lernmedion
5. motivi: doni al la lernantoj perspektivon – kion ĝui post la lernado kaj kursofina ekzameno
6. havi ete aŭ malpli ete da mono

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kaj ĝia instruista sekcio (ILEI-RS) en la antaŭaj du jaroj, hodiaŭ kaj plu:

1. Havis kaj plu havas iom lertajn instruantojn de Esperanto, kiuj gvidas diversnivelajn retkursojn. La plano estas plilertigi la jamajn kaj ekhavi novajn instruistojn tra diversaj instrutrejnaj Esperanto-seminarioj.
2. Trovis kursanojn per retanoncoj tra sociaj retoj kaj per afiŝoj sur anonctabuloj de lernejoj, universitatoj kaj aliaj institucioj – kursanojn kiuj jam iom lernis la lingvon, ekz. per Duolingo, lernu.net aŭ alimaniere, kaj tiujn, kiuj estas plenaj novuloj.
3. Uzis diversajn lernmaterialojn troveblajn rete aŭ en arkivoj de la instruantoj, aŭ speciale kreitajn por tiuj ĉi kursoj, ĉu de la kursgvidantoj ĉu de la kursanoj mem en la formo de hejmtaskaj eseoj aŭ buŝaj raportoj.
4. Estis spronita de la pandemio ekuzi avantaĝojn kaj alfronti defiojn de reta instruado, ĉi-kaze per la programo Zoom. Kaj alfronti la defiojn de inkluziva kaj diversigita instruado konsiderante la ĉeeston de vidantoj

kaj nevidantoj en la sama grupo de lernintoj kun diversaj atingoniveloj el la antaŭa lernado, diversaj aĝoj, diversaj profesioj kaj diversaj etnolingvaj fonoj (plejparte serba kaj hungara). Kreiĝis siaspeca retkomunumo de kunlernantoj, kiuj kune kaj solidare solvadis la lerntaskojn kaj, lingvoekzerce kaj amikiĝe, rakontis en la lernata lingvo erojn el siaj vivoj, medioj kaj sopiroj. Kaj organizis realajn renkontiĝojn ĉu okaze de la kursfinaj ekzamenoj, ĉu kiel memstarajn eventojn por kunumi kaj pli bone interkonatiĝi.

5. Stimulis la kursanojn transpreni gvidrolojn por specifaj taskoj en SEL, elektis kvar novajn estraranojn de la Ligo el la vicoj de novlernintoj, prezentis perspektivojn de plulernado, instrutrejniĝo, literatura kreado en Esperanto, aktiviĝo en la internacia Esperanto-komunumo kaj uzado de Esperanto en la ĉiutaga vivo.
6. Gajnis monsubtenon de sponsoroj en Serbio kaj subvencion el la EU-programo Erasmus+ apoge al progresigo de la instruado kaj lertigado de la instruantoj.

El Erasmus+

La programo KA1 (Key Action 1 – Ŝlosila agado 1) de Erasmus+ stimulas moviĝon de individuoj el/al diversaj landoj por la bezonoj de edukado, trejnado, plilertigado – ĉu kiel studentoj/trejnatoj, ĉu kiel instruistoj /trejnantoj. SEL, kun helpo kaj gvido de Kosmo - Strategio, proponis KA1-projekton por trejnado de volontulaj instruistoj kaj trejnistoj (origine: Training and Mobility for Voluntary Teachers and Trainers) kun instruado de Esperanto en la fokuso. Ni elektis kelkajn E-eventojn en Eŭropo, kie tia trejnado okazas kaj kie niaj instruantoj de Esperanto povus plilertiĝi. Ni ankaŭ proponis mem organizi trejnseminarion en Serbio. La projekto estis aprobita kaj SEL ricevis monsubtenon por

– stipendii en la jaro 2023:

- du partoprenantojn en la ILEI-kongreso 2023 kaj seminario „Interkultura kompetento”
- du partoprenantojn de la instrutrejna seminario de la Interlingvistikaj Studoj en Poznań, Pollando
- unu partoprenanton en la Hispana Esperanto-Kongreso en Sevilla, dum Oktobro 2023

– kaj por mem organizi en la jaro 2024 trejnseminarion en Serbio por instruista, interkultura kaj organiza plilertiĝo.

Impresojn de du niaj partoprenintinoj en la ILEI-kongreso en Lignano Sabbiadoro vi povas legi sur la paĝoj 6-7. Dum vi legas ĉi tion, du niaj instruistinoj jam partoprenas en la trejnado en Poznano.

Alvoko de SEL por kunlaboro

Ni planas la trejnseminarion en Serbio por la dua duono de Aŭgusto 2024 kun jena temaro:

- metodika kaj didaktika preparo por volontulaj instruistoj fokusita al lingvoinstruado
- interkultura konscio, edukado kaj kompetento
- organizado de eventoj, je diversaj niveloj
- subvencipetado el diversaj subvencifontoj kaj je malsamaj niveloj
- projekt-administrado, efektivigo, disvastigo kaj valorigo
- interreta komunikado kaj merkatumado
- rilatoj kun amaskomunikiloj, je diversaj niveloj

Enkadre de la KA1-projekto ni ricevis subvencion de Erasmus+ por moviĝo de du eksterlandaj fakuloj/trejnistoj en Serbion por instrui/trejni pri kelkaj el la listigitaj seminariaj temoj. Por la ceteraj temoj ni havas enlandajn fakulojn. Kaj ni havas kelkajn kandidatojn por trejniĝi en la seminario. Restas sufiĉa spaco por seminarianoj el aliaj landoj.

Se vi havas leĝe registritan organizon, ĝi povas proponi propran KA1-projekton por stipendii moviĝon de viaj instruistoj al Serbio cele al trejniĝo en la seminario en Aŭgusto 2024. Kaj al aliaj E-eventoj kun klerigaj kaj trejnaj celoj. Aŭ moviĝon de eksterlandaj spertuloj por instrui en trejnseminarioj, kiujn vi organizos. Penseblaj temoj por la seminarioj estas multaj, ekzemple:

- instruista trejnado
- aktivula trejnado
- interkultura kompetento
- interkultura proksimiĝo kaj interŝanĝo
- interkultura konscio ekde la infanĝardeno
- kreado de interkulturaj lerniloj kaj ludoj

- projektmastrumado
- informmastrumado kaj libera informfluo
  - inkluziva edukado kaj interkultura lernado
  - teknologia kaj metodologia progreso en lingvolernado

Ni restas je dispono por interkonsultiĝo kaj kunlaboro. Ni certas ankaŭ, ke Kosmo Strategio[4], kiu sukcesigis nian subvencipeton, daŭre pretas helpi verkadon de projektoj por Erasmus+.

Radojica PETROVIĈ, kunordiganto de la projekto
Aranka LASLO, sekciestro de ILEI-RS
Jovan ZARKOVIĈ, prezidanto de SEL

Superrigardo pri inkluziva lingvaĵo (II.)

Intervjuo al Cesco REALE[5]

de Alessio GIORDANO (Universitata Instituto IUSS Pavia)

AG: En kiuj lingvoj aperis ĉi tiuj bezonoj? Kiuj solvoj estis proponitaj ĝis nun?

CR: Ĉi tiuj demandoj leviĝas en pluraj lingvoj. Svedio, ekzemple, estas ĉe la avangardo de genra nediskriminacio: en 2014, la Akademio sveda enmetis en sian oficialan terminaron la pronomon sengenran (t.e. de nedifinita genro) *hen* (kun la signifo „tiu persono”), apud la tradicia *han* (li) kaj *hon* (ŝi). Tiu ĉi pronomo en la sveda jam estis proponita en 1966 kaj reproponita en 1994, sed nur ekde 2010 ĝi konsekvence ekdisvastiĝis.

Unuiĝintaj Nacioj lastatempe ellaboris direktivojn[6] por ĉiu el la 6 oficialaj lingvoj (araba, ĉina, franca, angla, rusa kaj hispana) ĝuste celantajn antaŭenigi la uzon de inkluziva lingvo.
Tiuj ĉi direktivoj klare restas en la limoj de la kutima lingvo, ili ne proponas neologismojn, sed invitas la alprenon de tri ĝeneralaj strategioj:

[4] http://kosmo.eu.com/?lang=eo
[5] La 1-a parto de la intervjuo aperis en IPR 2023/2.
[6] https://www.un.org/es/gender-inclusive-language/guidelines.shtml

1. Eviti diskriminaciajn esprimojn. Ekzemple, evitu la uzon de „fraŭlino”, aŭ de stereotipaj esprimoj, pli bone „sanpersonaro” ol „kuracistoj kaj flegistinoj”;
2. Kiam necese, emfazu genron per duobla formo prefere ol uzi la etenditan viran formon. Ekzemple: „knaboj kaj knabinoj” prefere ol „knaboj”; „la kandidat/oj/inoj” anstataŭ „la kandidatoj”.
3. Ne emfazu genron kiam ĝi ne estas necesa. Ekzemple: *rappresentanti* „reprezentantoj”(inkluziva formo) anstataŭ *alcuni rappresentanti* „kelkaj (virgenra) reprezentantoj”; „la dungitaro” anstataŭ „la dungitoj”.

Krom ĉi tiuj ĝeneralaj gvidlinioj, ekzistas specifaj gvidlinioj de UN por unuopaj lingvoj.
Sed ekster UN estas proponoj pri neologismoj kaj novaj formoj nur parte uzataj de la parolant-komunumoj.

En la angla ekzistas proponoj similaj al la svedaj, sed la ĉiam pli uzata opcio estas la uzo de *they* „ili” en la singularo: tiu ĉi solvo ebligas utiligi vortojn jam uzatajn por la triapersona pluralo (*they*, *them*, *their*, *theirs*, *themself*, „ili, ilin, ilia, la ilia, ili mem”) etendante ĝian signifon al la singulara nedifinita genro. En 2019, la singulara *they* estis akceptita de unu el la plej famaj anglalingvaj vortaroj, Merriam-Webster, kiu eĉ deklaris ĝin Vorto de la Jaro[7].

En la franca estas sufiĉe malfacile trovi kontentigan solvon por havi sengenrajn vortojn. Estas gvidiloj [8] por uzi kolektivajn substantivojn, duoblajn formojn (*tous et toutes*) aŭ asteriskon, restante ĉe la norma franca. Kaj estas proponoj[9] pri reformoj, kiuj enkondukas neologismojn, kiel *al* aŭ *iel* por la triapersona pronomo sengenra, apud *il* (li) kaj *elle* (ŝi).

En la hispana, male, oni trovis solvon kiu sufiĉe bone funkcias: la *-e-*. Apud la klasikaj *todo*, *toda*, *todos*, *todas*, („ĉiu” vira, „ĉiu” ina, „ĉiuj” vira, „ĉiuj” ina), nun *tode*, *todes* estas uzata pli kaj pli ofte por la nedifinita genro. En kelkaj okazoj tamen la problemo restas malfermita: en la kazo de *actor*, *actriz*, *actores*, *actrices* (aktoro, aktorino, aktoroj, aktorinoj) ankoraŭ ne ekzistas formo nedifinita.

[7] https://www.merriam-webster.com/wordplay/word-of-the-year
[8] https://langage-inclusif.com/
[9] https://www.alpheratz.fr/articles/un-genre-neutre-pour-la-langue-francaise/

La mandarena ĉina estas tre regula lingvo, kun neŝanĝeblaj silaboj, kiuj portas specifajn signifojn. Ekzemple, 人 (*rén*) = persono, 男 (*nán*) = masklo, 女 (*nǚ*) = ino, do 男人 (*nán rén*) = viro kaj 女人 (*nǚ rén*) = virino. La problemoj estas esence du.

1. La triapersona pronomo estas prononcata *tā* sendepende de la genro de la koncerna estaĵo – ĉu homa ĉu ne. Tamen, skribe, ĉi tiu pronomo povas esti skribata per kvin malsamaj signoj: 他 kiu signifas „tiu persono" aŭ „li", 她 kiu signifas „ŝi", 牠 kiu signifas „tiu besto", 它 kiu rilatas al aĵoj kaj plantoj aŭ 祂 kiu signifas „tiu dio aŭ tiu diino". Do, se en la parolado la problemo de la genro por la persona pronomo estas neekzistanta, tamen ĝi aperas skribe, tial ke por diri „li aŭ ŝi" oni uzas la viran 他, kaj por diri „ili (viroj kaj virinoj)" oni uzas la saman ideogramon kun aldono de silabo por la pluralo: 他們 (*tā mén*).
2. Por profesioj aŭ roloj kiuj historie estis (aŭ ankoraŭ estas) ĉefe viraj, kiam temas pri virino oni kutimas emfazi tion aldonante 女 (*nǚ*) = ina. Ekzemple, 法官 (*fǎ guān*) = juĝisto; 女法官 (*nǚ fǎ guān*) = juĝistino.

La UN-direktivo[10] rekomendas en ĉi tiuj kazoj uzi 人 (*rén*) anstataŭ 他 (*tā*), por eviti la unuan problemon, kaj pli ĝenerale ne indiki la genron, krom se ĝi estas nemalhavebla, por eviti la duan problemon.
Por kompletigo de informoj, oni devas diri ke ekzistas ankaŭ lingvoj en kiuj la debato por inkluziva lingvo preskaŭ ne ekzistas, ĉar pro historiaj kaj kulturaj kialoj plejparto de la homoj ne konsideras ĝin grava. Tiel estas ekzemple ĉe la rusa kaj la araba.

En la rusa, pasintaj verboj havas viran singularan finaĵon, inan singularan finaĵon, kaj pluralan finaĵon. Tiuj, kiuj volas uzi sengenran lingvon, ĉiam uzas la pluralon en la pasinteco eĉ por rilati al ununura persono.

En la araba, aliflanke, eĉ la dua singulara kaj dua plurala persono havas viran kaj inan versiojn; tiuj, kiuj volas eviti la indikon de genro, ofte uzas la dualon, kiu en la araba rilatas al du homoj de nespecifita genro: ekzemple أنتُما (*ántuma*), kiu signifas „vi ambaŭ", estas uzata por diri „vi" sengenra. Kaj هُما (*huma*), kun la signifo „ili ambaŭ", estas uzata por signifi „tiu persono".

[10] https://www.un.org/zh/gender-inclusive-language/guidelines.shtml

En la germana la plej ofta maniero esprimi nedifinitan genron estas asterisko, kiu estas uzata en multaj substantivoj, inter la vira radikalo kaj la ina sufikso *-in-*; ekzemple *Kollegen* signifas „kolegoj”, *Kolleginnen* signifas „koleginoj” kaj *Kolleg*innen* estis enkondukita kiel sengenra formo. Multaj germanlingvanoj konas ĝin nur skribe, sed ekzistas ankaŭ la konvencio prononci ĝin per sono nomata glota plozivo (en nia ekzemplo [koˈleːkʔɪnən]), kiu lastatempe fariĝis pli konata danke al kreskanta nombro da televidaj kaj radiaj programoj, kiuj uzas ĉi tiun prononcon. Kiel alternativo al la asterisko, ankaŭ dupunkto estas foje uzata: *Kolleg:innen* , aŭ substreko: *Kolleg_innen*. La prononco estas la sama kiel por la asterisko. Kelkaj ankaŭ uzas steleton en la singularo. Sed pli kaj pli da homoj (precipe neduumuloj, sed ne nur) vidas la bezonon de solvo pli facile prononcebla ol la ĵus menciitaj. Jam ekzistas pluraj proponoj tiusence, kiel ekzemple tiuj priskribitaj en ĉi tiu retejo[11].

La svahila havas idealan situacion: ne ekzistas gramatika genro, nek vira nek ina, do la ĉi tie pritraktataj problemoj ne ekzistas. Substantivoj, adjektivoj, pronomoj kaj verboj estas ĉiuj sengenraj. Ekzemple, ekzistas nur unu tria singulara pronomo (*yeye*) kaj unu tria plurala pronomo (*wao*), do ne estas diferenco inter „li” kaj „ŝi” aŭ inter vira kaj ina „ili”. Krome, ĉiuj profesioj estas sengenraj, eĉ tiuj tipe viraj aŭ inaj.

En Esperanto, la debato pri la sengenraj proponoj disvastiĝis tre rapide, ĉar la esperantistaro estas laŭ sia deveno tre sentema al diverseco kaj inkludo. Ĉar Esperanto estas regula lingvo, estis facile trovi solvon, kiu funkcias bone. La plej uzataj proponoj estas du:

1. Esperanto havas la sufikson *-in-* por la ina (prenitan el la germana); oni aldonis sufikson *-iĉ-* por la vira. Do ekzemple: *profesoro* (kiu en norma Esperanto indikas la viran aŭ nedifinitan) en inkluziva Esperanto estas uzata nur por la nedifinito; *profesorino* estis kaj restas ina; *profesoriĉo* estas nova formo kaj estas nur vira.
2. *Ri* estis aldonita al *li* kaj *ŝi* por indiki „tiu persono” (sen indiko de genro).

[11] https://geschlechtsneutral.net/

Laŭ studo[12] de Marcos Cramer (ano de la Akademio de Esperanto), la pronomo *ri* estas jam komprenata de 81% kaj uzata de 38% de la esperantistaro.

AG: Kia estas la situacio en la itala?

CR: Estas multaj proponoj en la itala. Iuj uzeblas nur skribe kaj ne prononceblas: ekzemple la steleto aŭ la heliko kaj singulare kaj plurale: *È andat* via*, *Ciao a tutt** aŭ *È andat@ via*, *Ciao a tutt@* („Ri foriris" kaj „Saluton al ĉiuj").

Prononcebla propono estas *u*: *È andatu via*, sed ĝi povas esti uzata nur en singularo.

La propono, kiu plej disvastiĝas, estas tiu de ŝvao (ə), fonetika simbolo, kiu indikas centran vokalon, kiu ne ĉeestas en la itala, sed jes en multaj lokaj italo-romanidaj lingvoj (ekzemple napola kaj piemonta), kiel ankaŭ en la angla, franca, germana, ĉina, rusa kaj aliaj.

Itala Inkluziva[13] retpaĝo proponas ankaŭ la simbolon *ɜ* por la pluralo; tiu ĉi fonetika simbolo indikas alian centran vokalon tre similan al ŝvao, sed iomete pli malferman. Vi povas aŭdi ĉi tiujn vokalojn en klakebla fonetika alfabeto[14].

Tiu ĉi propono de la centraj vokaloj (ə, ɜ) havas la avantaĝon esti prononcebla kaj distingi singularon kaj pluralon, sed ĝi prezentas ankaŭ kelkajn malavantaĝojn:

1. Por iuj tio ne estas facile prononcebla, ĉar ili estas sonoj fremdaj al la itala;
2. La diferenco de prononco inter singularo kaj pluralo estas minimuma kaj malfacile perceptebla eĉ por spertaj fonetikistoj;
3. En elektronika skribado tiuj simboloj ne estas tre oftaj.

AG: Ĉu alternativaj solvoj eblas?

CR: Alternativa solvo povus esti trovi pluralon por *u*: ekzemple, ĉar *tutti/e* („ĉiuj") ofte jam estas uzata (por indiki „vira kaj/aŭ ina"), oni povus simple

[12] https://lingvakritiko.com/2020/05/12/la-efektiva-uzado-de-seksneutralaj-pronomoj-lau-empiria-esplorstudo/
[13] https://italianoinclusivo.it/
[14] https://www.lfsag.unito.it/ipa/index.html

forigi la oblikvan strekon, kreante la finaĵon *-ie* kaj uzante ĝin por la nedifinita pluralo (vira kaj/aŭ ina kaj/aŭ alia genro). Ekzemple: *tuttie* („ĉiuj”).

Tiu ĉi propono povus esti kombinita ankaŭ kun la uzo de centraj vokaloj: fakte multaj neduumuloj atentigas, ke krom la nedifinita genro necesus ankaŭ neduuma genro, por indiki tiujn, kiuj identiĝas nek kun la vira nek kun la ina genro. Ekzemple, tiu ĉi genro jam estas agnoskita en la germana en laboranoncoj, kie, se antaŭe *m/w* (*männlich/weiblich*, t.e. „vira/ina”) estis skribita por emfazi, ke oni serĉas aŭ viron aŭ virinon, hodiaŭ estas ofte vidi *m/w/d*, kie *d* signifas *divers* („alia”).

Laŭ ĉi tiu vidpunkto, la centraj vokaloj (ə, ɜ) povus esti uzataj por indiki neduuman genron, dum la finaĵoj *u* kaj *ie* povus esti uzataj por nedifinita genro, do kiel inkluziva formo.

AG: Kian estontecon vi antaŭvidas por ĉi tiuj lingvaj uzoj?

CR: La tendenco ŝajnas montri ke, en lingvoj kie la debato estas viva, nova inkluziva lingva formo ekfiksiĝas aŭ ekfiksiĝos. Tamen, tio dependas ne nur de socikulturaj cirkonstancoj, sed ankaŭ de pure lingvaj faktoroj: kiel dirite, en iuj lingvoj (hispana, sveda, Esperanto) ekzistas solvoj sufiĉe bonaj fonetike kaj morfologie, dum en aliaj (franca, itala) la serĉado estos ankoraŭ longa. La uzado decidos.
Por italparolantoj, kiuj interesiĝas pri diskuto pri la temoj de ĉi tiu intervjuo, mi kreis Vizaĝlibran grupon: Italiano inclusivo agènere[15].

Por scii pli:

D. Baron, *What's Your Pronoun? Beyond He & She*, Liveright, New York 2020.
F. Corbisiero; P. Maturi; E. Ruspini (eld.), *Genere e lingua. I segni dell'uguaglianza e della diversità*, FrancoAngeli, Milano 2016.
M. Cramer, *La efektiva uzado de seksneŭtralaj pronomoj laŭ empiria esplorstudo*, en: „Lingva Kritiko”, 12 majo 2020.
M. Cramer, *Seksneŭtralaj parencovortoj - rezultoj de opinisondo*, en: „Lingva Kritiko”, 6 januaro 2021.
C. Di Costanzo, *„Toccare la lingua è come toccare la persona stessa”. Sessismo linguistico in italiano e nelle lingue europee*, Aracne, Romo 2020.
A. Giordano, *Genro kaj sekso en nia percepto pri la lingvo*, en: „Literatura Foiro”, 319: 291-301.

[15] https://m.facebook.com/groups/378309436815137

Ĉinio

Unika seminario pri legado okazis en unika E-etosa lernejo en la mondo

Esperanta seminario pri librolegado okazis de la 13-a ĝis 16-a de julio en la elementa lernejo Baiyangshujie, la urbo Taiyuan, Ĉinio. Partoprenis 16 personoj el la urboj Beijing, Changzhou, Hangzhou, Jiaxin, Nanchang, Xinxiang kaj Taiyuan. Kvin el ili estas junaj E-instruistinoj el la gastiganta lernejo kaj 3 emeritaj profesiaj esperantistoj el Beijing. La seminario hibride okazis: ĉeeste kaj enrete. Ankaŭ tiuj grupanoj, kiuj ne fizike venis al la urbo Taiyuan, ĝuis la prelegojn rete kaj varme partoprenis en la diskutoj. Nekompleta kalkulo: averaĝe, ĉiuduontage 30 personoj rete partoprenis.

En la inaŭguro gratulvortojn faris veterana pekina esperantisto, reprezentanto de la legogrupo, kaj nove-veninta grupano, respektive. La seminario havis riĉan programon. La lernejestro WEI Yubin (Jado), sekciestro de ILEI-CN, faris priteman prelegon titolitan „Mia pripenso pri la Esperanta legado". La grupfondinto, prof. d-ro GONG Xiaofeng (Arko) prezentis la evoluadon kaj atingojn de la legogrupo, kiu jam daŭras 5 jarojn kaj kies nombro kreskis al 96 grupanoj. Ĝis nun jam 8 romanoj estas finlegitaj kaj la naŭan romanon „La Faraono" la grupo ĉi-momente komune legas. Aliaj 7 prelegoj temas pri pensoj postlegadaj, legindaj romanoj en Esperantio, legomaniero, pri verkado, pri la legoplano k.a. Du junaj E-instruistinoj prezentis la lokan vidindaĵon kaj sian hejmlokon, respektive. Krome, la 16-an de julio, ni ĉiuj partoprenis per ZOOM kaj aŭskultis prelegon de la fama E-aŭtoro Trevor STEELE (Aŭstralio), kadre de ĉiumonata prelegserio (julio 2023). Kvankam ĝi estis ekster nia programo, tamen Trevor estas nia ŝatata aŭtoro, lia unua romano „*Sed Nur Fragmento*" estas la sepa finlegita libro de nia legogrupo, ĝia komuna legado daŭris 6 monatojn.

Dum la seminario okazis ankaŭ voĉlegado de poemoj, kaj libro-interŝanĝoj, hibride paroliga kurso de BEK-kurso, kiun gvidis Arko. Ĉiuj partoprenantoj ricevis 4 plej freŝajn E-librojn eldonitajn en Ĉinio kiel donacojn, nome, du librojn de Laŭlum: „*Promenado en Esperanta ĝardeno*" kaj „*Kurso pri traduka arto de Esperanto*"; „*Rakontoj pri la Silka Vojo*" kun koloraj bildoj, esperantigitan de Zaozhuang-Universitato kaj ties ĉinan version. En la tuttaga ekskurso seminarianoj vizitis la faman vidindaĵon Jinci, kiu allogis nin ĉiujn. En la lasta tago okazis varma kunsido kun junaj E-instruistoj kaj ni faris opinio-interŝanĝojn pri legado, lernado kaj estonta evoluo de E-legado kaj E-instruado.

Ĉi tiu seminario estas nia 5-a seminario, sed ĉiuj antaŭaj 4 seminarioj okazis enrete. Danke al la klopodo de ni grupanoj, aparte de la lernejestro Jado, ĉina sekciestro de ILEI, nia legogrupo povis unuafoje sukcese okazigi ne nur surlokan sed hibridan seminarion. La lernejestro kaj ĉiuj junaj E-instruistinoj meritas ĉian laŭdon. Sen ilia subteno ne estus ĉi-foja seminario. La E-etoso, E-simboloj kaj E-objektoj de la lernejo estas montrataj tra la tuta kampuso, tio ege mirigis nin kaj ricevis unuaniman admiron de ĉiuj. Ĝi ja estas unika elementlernejo kun Esperantaj trajtoj en Ĉinio, eĉ en la tuta mondo.
Kun granda entuziasmo kaj fruktodona rikolto ni esperas, ke tiuspeca seminario daŭros en la venonta jaro, kaj antaŭĝojas, se pli da legemuloj partoprenos.



GONG Xiaofeng (Arko)

Italio

Gasto el Afriko

Meze de junio, la Parma EO-Grupo „Canuto” gastigis dum kvar tagoj John Magessa, la ĝeneralan sekretarion de la Loka Kongresa Komitato de la 109-a UK, kiu okazos en Tanzanio en 2024.

John estas instruisto pri la angla lingvo kaj geografio en mezlernejo. Do li petis sabatan jaron por travojaĝi 8 eŭropajn ŝtatojn (Germanion, Italion, Francion, Nederlandon, Belgion, Aŭstrion, Slovakion kaj Pollandon) kaj informi pri sia lando kaj la venonta Universala Kongreso de Esperanto. Li prelegis havante surŝultre tukon nomatan KiKo, tipan el la tribo Masai. Li mem apartenas al alia etno.

Lia prelego estis brila, atentokapta, ĉefe kiam li ilustris la naturan medion de la lando. Interalie, en Tanzanio troviĝas Kilimanĝaro, la plej alta afrika monto, kaj Serengeti, famkonata nacia parko.

John estas preskaŭ denaska parolanto de Esperanto, ĉar lia patro instruis al li la lingvon kaj nun li mem konigas ĝin ankaŭ danke al apoj. Ni ege ĝuis lian partoprenon en nia evento kaj esperas, ke lia emo konigi la unuan Universalan Kongreson en Afriko estos sukcesa kaj multe da homoj povos partopreni en ĝi.



Cosetta BERNARDI, vicprez. de la E-grupo „Giorgio Canuto" de Parmo
Surfote: John Magessa (la dua de maldekstre) kun parmanoj

Kroatio

Ekspozicio pri Esperanto en la Zagreba Urba Biblioteko

En aprilo 2023 Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) organizis ekspozicion pri Esperanto en la urba biblioteko Tina Ujevića en Zagrebo. La celo estis informi vizitantojn, e-istojn kaj neesperantistojn pri la internacia lingvo Esperanto: la ekspozicio prezentis la historion de Esperanto, kio ĝi estas, kiam kaj kial ĝi naskiĝis, kiu estas la aŭtoro.

Estis prezentitaj famaj esperantistoj: Zamenhof, Tibor Sekelj, Ivo Lapenna, Lev Tolstoj kaj Papo Johano la dua. La ekspozicio montris la Esperanto-alfabeton, kelkajn poemojn. Sur unu breto oni prezentis la kroatan literaturon tradukitan al Esperanto. Temis pri la kroataj aŭtoroj: Miroslav Krleža, Ivo Andrić, Ivana Brlić-Mažuranić, Slavko Kolar, Kristian Novak kaj aliaj.



La Kroata Landa Televido vokis la aŭtorinon de la ekspozicio, Marija Jerković, ke ŝi en la unua kanalo prezentu Esperanton. Ŝi parolis pri la historio de Esperanto en Kroatio kaj pri la celoj de Esperanto, kiuj kongruas kun la celoj de UNESKO. La Ministerio de Kulturo proklamis la tradicion de la Esperanto-movado kultura nemateria heredaĵo de Respubliko Kroatio. La ekspozicio daŭris du semajnojn kaj multaj vizitantoj vidis ĝin.

Marija JERKOVIĆ

Serbio

Kursofina ekzameno kun invito daŭrigi la lernadon

La 24-an de junio 2023 Serbia Esperanto-Ligo (SEL) okazigis ekzamenojn en Beogrado por la kursanoj kiuj finis 7-monatajn retajn kursojn de Esperanto. La unua grupo ekzameniĝis je la niveloj: A – komencantoj, A – paroliga por komencintoj kaj B – progresiga. Gratulojn al la 6 kandidatoj kiuj sukcese trapasis la ekzamenojn.

Grandan dankon al la teamo de instruistoj kiuj realigis la kursojn (en alfabeta ordo): Aranka LASLO, Zlatoje MARTINOV, Živanko NOVAKOV, Radojica PETROVIĆ kaj Jovan ZARKOVIĆ. Dankegon ankaŭ al Nedeljka LOŽAJIĆ kaj al la Biblioteko „Milan Budimir” pro la disponigo de ejoj por la ekzameno.

Aŭtune ni atendas la duan grupon de kursanoj por ekzameniĝi ĉeeste.

Laŭplane, same aŭtune, ni komencos la trian serion de kursoj (kalkulante ekde la refondiĝo de SEL): por komencantoj (aparte por blinduloj), komencintoj kaj progresantoj – laŭ la interesiĝo.

Jam certas, ke la 6-an de novembro komenciĝos internacia B-kurso pri E-literaturo, sub la gvido de Zlatoje MARTINOV, en Esperanto, per Zoom. Liaj prelegoj okazos ĉiun duan lundon po unu horo. Ni invitas ĉiujn interesiĝantojn aliĝi al tiu ĉi priliteratura kurso tra la retadresoj laslo.az@gmail.com kaj zlatoje@yahoo.com.



Aranka LASLO

Ukrainio

Al instruado neniam io povas malhelpi!

Mi estas Svetlana Pogorelaja, esperantistino de 1973, profesia instruistino de fremdaj lingvoj, profesia ĉiĉeronino. Mi havas pli ol dek diversajn oficialajn diplomojn.

Nun mi volas rakonti pri tio, ke mi instruas Esperanton senĉese dum multaj jaroj, eĉ en la lastaj jaroj pli multe kaj pli multe! Al mi neniam io povas malhelpi aktivi por Esperanto kaj instrui Esperanton.

Antaŭnelonge mi konversaciis pri instruado kun la estimata Duncan Charters. Li samopinias, ke se iu volas labori, nenio povas malhelpi instrui. Do certe mi ne ĉesas helpadi al ukrainoj kaj alilandanoj.

Kiam komenciĝis la kvaranteno, mi estis petita de alilanda instruistino helpi al ŝi paroligi, perfektigi kaj aktivigi la lernantojn. Post kelkaj monatoj mi estis invitita kuninstrui kun du aliaj alilandaj bonaj instruistoj al iliaj kelkaj grupoj. La lecionoj por ĉiu grupo estis okazigataj 1-foje semajne. Mi ricevadis grandegan plezuron vidante la bonajn sukcesojn de la lernantoj, kiuj ĉefe estis pensiuloj. La plej kuraĝaj jam partoprenas en internaciaj aranĝoj ĉeeste aŭ virtuale, iuj eĉ elpaŝas.

Ekde la fino de februaro 2022 mi komencis helpi al miaj lernantoj, kiuj ĉiuj estas miaj geamikoj, eĉ pli intense: per ĉiutagaj nelongaj helpoj!

Jes, por miaj lernantoj estas grave ĉiumatene konvinkiĝi, ke mi estas vivanta. Kaj por mi estas grave pli kaj pli multe helpi al ili. Mi speciale elektadas diversajn emociantajn materialojn. Ekzemple mi aperigis fotojn de florantaj meze de novembro en Kijivo kaŝtanarboj, pomarboj, leontodoj kaj aliaj plantoj. La lernantoj aktive reeĥis per sendo de fotoj de iuj floroj en siaj urboj kaj iom skribis por klarigi. Mi gratulas okaze de diversaj internaciaj festoj. La lernantoj rakontas pri sialandaj festoj. Oni eksigas preskaŭ ĉiutage en mia domo por la tuta tago samtempe elektron, akvon, varmigon. Mi informas pri tio, ĉar nemalofte en tiuj tagoj ne funkcias ankaŭ telefono, interreto. La tekstetoj de miaj lernantoj fariĝas pli kaj pli longaj kaj interesaj.

Mi neniam permesas al miaj lernantoj paroli aŭ skribi kun eraroj. Do la progreso estas bona. Bedaŭrinde dum ĉirkaŭ dek jaroj preskaŭ neniu instrua laboro (preparo de novaj esperantistoj) en Ukrainio estas okazigata. Sed mi de tempo al tempo diskonigas informojn pri miaj eltrovaĵoj, pri la rezultoj de miaj lernantoj por elvoki ĉe ukrainoj la deziron ripeti almenaŭ ion, ekinstrui kaj komenci ricevadi ĝojon de poresperanta laboro. Ja tio estas facila.

Al mi absolute nenio malhelpas instrui. Kelkfoje okazis, ke dum la lecionoj sonis eksplodoj post la faloj de partoj de raketoj je unu kilometro de mia domo, iam ege tremis la fenestroj pro tre proksimaj eksplodoj. Sed mi ne haltigis la lecionojn! Nenio povas malhelpi! La kvaranteno; la eksplodoj; la aeratakaj alarmoj; tio ke mi estas mizera kun la pensio de nur malpli ol 2 eŭroj por tago; tio ke dum multaj monatoj mia 93-jaraĝa patrino estis tre malsana, kuŝanta en la lito kaj mi sola zorgis pri ŝi dum la tagoj kaj la noktoj; la morto de mia patrino; tio ke mi en 2022 trifoje serioze longe malsanis; tio ke mi antaŭnelonge estis en malsanulejo pro serioza kormalsano kaj nun

preskaŭ ne povas paŝi kaj preskaŭ ne eliras el la hejmo... Mi sencêse ĉiutage instruas.

Karaj instruistoj! Ne timu, ke vi ne kapablos instrui en malfacila por vi periodo.

Ege bone prepariĝu kaj instruu. Disdonadu al la aliaj tiun feliĉon: ekparoli Esperanton kaj ekuzadi ĝin.

Por 2022 mi preparis kelkajn tre malmultekostajn, sed en komfortaj kondiĉoj kaj kun granda programo, Eo-aranĝojn. Por ĉiuj miaj ukrainaj kaj alilandaj grupoj mi preparis specialajn aranĝojn ĝuste laŭ iliaj anticipaj mendoj. Bedaŭrinde en Ukrainio ne eblis ilin okazigi en 2022, sed nepre tio eblos en estonteco. Se vi volas ion vidi en Kijivo, sendu mendojn: *universitato3a@ukr.net*. La ekskursoj povas esti virtualaj nun aŭ ĉeestaj poste. Bonvenon!

Svetlana POGORELAJA, urbo Kijivo, Ukrainio

AMO, EKO kaj dissendo de instruhelpiloj


Post la junia jubilea seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) en Hungario, sekvis en julio AMO 101 en Latvio (nova lando por la AMO-seminarioj), kaj en aŭgusto AMO 102 kadre de la Kongreso de ILEI en Italio.
Planoj por la cetero de la jaro estas nun prilaborataj: El Itala-Pola kunlaboro rezultos seminario oktobre kun la temo ‘Virinoj, kiuj ŝanĝis la mondon’. Kroatio gastigos seminarion pri bibliotekoj novembre. Restas klopodoj okazigi seminarion en Fortaleza ene de la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE). Tiu okazos komence de novembro. Restas invito al Afriko gastigi seminarion en la jarfina periodo.
Jam disiris en 2023 kvardek sep komunikoj de EKO, ĉefe pri la landa kaj faka agado. La 48-a Komuniko estas en preparo. Do, baldaŭos la kvindeka. Tiuj komunikoj multe raportas pri la laboroj de ILEI, danke al tre regula ricevo de mesaĝoj de la nuna estraro de la Ligo. Kun lastatempaj komunikoj disiris alkroĉite instruhelpaj dokumentoj el la kolekto tenata ĉe la nuna verkinto.

Stefan MACGILL, Hungario

Malkovru, lernu kaj uzu Esperanton kun uTalk!

Ĉu vi sciis, ke ekzistas laŭloka lingvolernada programo, kiu ebligas al vi lerni Esperanton elire de iu ajn lingvo, kiun vi jam parolas?

La uTalk-apo celas helpi homojn lerni kiel rekoni kaj elparoli pli ol 2 500 utilajn vortojn kaj frazojn de Esperanto.
uTalk estas londona eldonejo de lingvokursoj, fondita en la jaroj 1990 kun la nomo Eurotalk (Eŭrotalk). La eldonejo nun havas kursojn en pli ol 150 lingvoj, inkluzive de Esperanto.
EuroTalk ekde 2007 entuziasme dediĉis sin al Esperanto-kursoj. Unu el la dungitoj eĉ komencis lerni ĝin. La fakto, ke EuroTalk simpatias kun Esperanto evidentiĝas ankaŭ en tio, ke ĝi estas unu el la ĉefaj sponsoroj de Amikumu ekde ties fondiĝo.



Figuro 1: iuj lingvoj el la uTalk-gamo

uTalk
En 2015 EuroTalk spertis gravan ŝanĝon kun la transformo al uTalk. Kun (tiam) 128 lingvoj en la gamo, la origina eŭropa karaktero ne plu estis aplikebla. La entrepreno celis konkeri la mondon kaj ne plu sufiĉis funkciigi la kursojn nur en reta formo. Estis lanĉita la uTalk-apo, havebla en la vendejoj de Guglo kaj Apple, kaj la kurso vastiĝis al 65 temoj. La temoj koncernas ĉiutagaĵojn, kiel ekz. manĝado kaj trinkado, butikumado, kuirado,

irado al restoracio, vojaĝado, sano kaj sporto. La Esperanto-kurso havas temon eĉ pri Esperanto mem, kiu malkaŝas pinton de nia kulturo. La kursmaterialo estas tre utila por komencantoj; eĉ se gramatiko ne estas eksplicite klarigita, ekzistas kelkaj temoj pri gramatikaĵoj: pri prepozicioj, adverboj ks..



Figuro 2: iuj temoj

Kiel funkcias uTalk?

Ĉiu lingvo uzas la saman vortprovizon. La granda avantaĝo de tio estas, ke vi povas lerni Esperanton el ĉiuj aliaj lingvoj kaj inverse. Se vi, ekzemple, volas lerni la svahilan, por montri vian scipovon dum la venontjara Universala Kongreso en Tanzanio, vi povas fari tion ankaŭ per Esperanto.
uTalk instruas vin kiel prononci kaj rekoni utilajn vortojn kaj frazojn por ke vi povu tuj ekparoli. Ĝi estas perfekta por komencantoj kaj valorega por komencintoj serĉantaj plenigi mankojn en siaj vortprovizo kaj prononco.

Ĉiu temo funkcias laŭ fiksa ŝablono: ekzercado de vortoj aŭ frazoj, facila ludo, parolludo, malfacila ludo kaj memorludoj. Vi lernas la lingvon ludante.



Figuro 3: la ekzercaro

La Praktika sekcio de uTalk enkondukas novajn vortojn en vian mallongan memoron, dum ĝiaj aliaj kvin ludoj, kiuj iom post iom fariĝas pli malfacilaj, celas enigi ilin en vian longdaŭran memoron. La ludoj estas desegnitaj por esti mallongaj sed sufiĉe malfacilaj, do, eblas, ke vi ne ricevos ĉiujn poentojn je la unua fojo – do, vi havos tempon por halti, refreŝigi la lernitaĵojn kaj

reveni al la temo poste. Tio estas ĉar tempe dispartigita ripeto pli utilas por la memoro ol unufoja plenŝtopado.
Ĉiu vorto, kiun vi aŭdas, estas esprimita de denaskaj parolantoj. Almenaŭ en preskaŭ ĉiuj lingvoj. En Esperanto tio iom malfacilas. Tamen, ni estas feliĉaj, ke por la virina voĉo kontribuis Katalin Kováts kaj por la vira voĉo Sylvain Lelarge. Cetere la esperantigon de la kursmaterialo prizorgis Katalin Kováts kaj Jones Malcolm.
Ĉiu vorto aŭ frazo estas ligita al bildo, ĉar tio helpas plifortigi la memorprocedon. Dum la ekzercado oni ricevas poentojn por ĝustaj respondoj, kiuj instigas al daŭrigo de la lernado. La aplikaĵo rimarkas, pri kiuj vortoj vi eraras kaj poste testas vin pri ili pli ofte. Pere de la kolektitaj poentoj eblas akiri novajn temo-pakaĵojn.
Sed la plej grava afero estas, ke ĝi donas al vi la fidon komenci paroli kaj kompreni ŝlosilvortojn tuj de la komenco.

uTalk klasĉambro
Memstudado estas bona. Sed ĝi postulas memdisciplinon kaj ne ĉiuj posedas tion samgrade. *uTalk Klasĉambro*, povas helpi reteni la studentojn de ĉiuj aĝoj engaĝitaj en lingvolernado!
Ĉu vi estas instruisto? Havu vian tutan klason por lingvaj ludoj sur iu ajn aparato kaj vidu kiel ili komencas pliigi siajn poentarojn kaj plibonigi siajn parolkapablojn kaj aŭskultkomprenadon. Instruistoj povas monitori la studentan progreson sur ekrano, kiu estas ĝisdatigita ĉiutage. Tiel vi povas tuj vidi, kiuj studentoj ricevas la plej altan poentaron kaj kiuj bezonas kroman puŝon. Vi eĉ povas igi ilin konkuri unu kontraŭ la alia, se vi volas aldoni eĉ pli da amuzo!
Finfine vi povas doni al viaj studentoj bronzan, arĝentan aŭ oran atestilon post kiam ili akiris sufiĉe da poentoj.

Senpage aŭ ne?
Senpagaj kursoj de E-o oftas en Esperantujo, danke al organizoj kaj volontuloj.
La unua temo en uTalk, *Komencaj vortoj*, estas senpaga kaj vi povas malŝlosi iujn kromajn temojn senpage ludante en-apajn ludojn. Sed fari altkvalitan apon kostas monon do, samkiel lernejoj devas pagi instruistojn, uTalk devas pagi lingvospertulojn kaj programistojn. uTalk estas sendependa eldonejo, kiu nek estas ŝtatsubvenciita, nek havas sponsorojn, nek laboras per volontuloj.

Eble ĝi povus uzi reklamojn por kovri la kostojn, sed kiu volas esti bombardata per reklamoj kiam oni provas lerni? Edukado estas valora kaj, foje tio signifas, ke ĝi kostas. En la apo vi nenie vidos reklamon aŭ limojn.

Do, kiom ĝi kostas?
En la apo-vendejoj de Guglo kaj Apple vi pagos pli-malpli po €60,- por lingvo. Tiu donas licencon por la tuta kurso nelimigitan en la tempo. Nuntempe uTalk ŝanĝas sian politikon kaj transiras pli kaj pli al abonsistemo. Je uTalk.com vi povas preni abonon por unu, ses aŭ dek du monatoj.
Por Esperanto-lernontoj, la aŭtoro kreis ĉi-jare specialan ligilon, www.lingvejo.com/eo , kiu ligas al uTalk.com sed donas grandan rabaton. Nun vi povas eklerni Esperanton jam ekde po €1,- por monato.

Resume
uTalk estas provita lernmetodo, kiu funkcias sur ĉiuj platformoj. Ĝi estas facile uzebla kaj faras la lernadon amuza. Enestas pli ol 150 lingvoj, kio donas pli ol 20 000 lingvajn kombinaĵojn. Ĝi instigas sendependan lernadon. uTalk uzeblas por privatuloj, lernejoj, organizoj kaj entreprenoj.
Kromaj lecionoj pri la gramatiko de Esperanto helpos kursantojn ankoraŭ pli bone kompreni la kursmaterialon. Bonega prezo/kvalito-rilatumo.
Por ĉiuj kromaj informoj kontaktu la aŭtoron de la artikolo: rob@cdline.be

Rob EBENAU,
direktoro de CDline en Belgujo, distribuisto de eduka programaro kaj iniciatinto de la Esperanto-versio de uTalk

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits, Nvard Manveljan.
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatu en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELYAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, Erevan, 0010, Armenia, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: ING Bank N.V., kontonumero: 4676855, IBAN: NL55 INGB 0004 6768 55, BIC/SWIFT: INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.
b) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
c) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (kontonumero: 378964; IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj.
Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Vian retaliĝilon sendu al la membro-prizorganto Hamzeh Shafiee: hamzeho@gmail.com kaj samtempe al ILEI-kasistino Karine Arakelyan: ilei.kasisto@gmail.com. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530.* Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
Adreso de la nova arkivo de IPR: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.
Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2023,
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2023.



*La gestudentoj de la Esperanto-fako de Zaozhuang-Universitato, kun la helpo de internacia teamo de geinstruistoj, tradukis libron pri la historio de la Silka Vojo. La bele ilustrata volumo estis oficiale donacita al gravuloj dum la UK 2023, en kiu partoprenis i.a. la Vicprez. de la Universitato. En la foto, Alessandra Madella (*dekstre*) transdonas la elegantan volumon al Silvia Costantini, Ĝenerala Konsulo de Italio en Montrealo kaj honora gasto de la Torina UK.*



